



*Revista*

*Revista*

\* L'Espéranto rapproche les peuples du monde entier \*

Organo Oficial de  
L'INSTITUT CONGOAIS D'ESPERANTO  
(A.S.B.L.)

Rédaction - Administration  
B.P. 7579 - KINSHASA 1.  
(Congo)

S O M M A I R E

E N H A V O

- Subtenu la movadon en Kongo.
- Kelkaj vortoj de la Prezidanto.
- Ĝenerala konferenco de U.N.E.S.C.O.
- Alvoko de delegito.
- Kial ni ne sendus delegiton el Kongo al Tel Aviv ?
- L'Espéranto dans le monde.
- K.E.I.- komunikoj.
- Deziras korespondi.

A L V O K A S

ĈIUJN ESPERANTISTOJN LOĜANTAJ EN EVOLUINTAJ LANDOJ . . . .

pozitive subteni nian movadon en Kongo , pagante , laŭ viaj  
financaj eblocoj , kotizon al :

U.E.A. , Nieuwe Binnenweg 176 , ROTTERDAM , Nederlando.

(nepre menciu kun via pago : "subteno al Konga Esperanto-Instituto")

(nepre sendu al K.E.I. sciigon pri via donaco !)

Tielmaniere vi helpas la Esperanto-movadon en Kongo e k z i s t i . . .

La amikoj kiuj donacas minimume : 2 Usonaj Dolaroj

aŭ 8,5 D.M.

aŭ 10 francaj frankoj

aŭ 100 belgaj frankoj

aŭ 28 steloj

ricevas dum unu jaro nian revuon kaj aliajn publikajojn.

\*

SOUTENEZ LA PROPAGATION DE L'ESPERANTO AU CONGO . . . EN DEVENANT MEMBRE  
DE L'INSTITUT CONGOLAIS D'ESPERANTO !

C o t i s a t i o n s             a n n u e l l e s :

MEMBRES EFFECTIFS : Adultes	:	500 F (simples)
		1.000 F (de soutien)
Etudiants (non universitaires) :	:	50 F

Comment et où payer ? directement à M. David SALAMBI, rue Kasongo-Lunda  
249, ST. JEAN. (Kinshasa), ou par mandat-postal à  
ESPERANTO-INSTITUTO, B.P. 7579, Kinshasa 1.

\*\*\*\*\*

Miaj karaj amikoj !

La jaro finiĝas kaj nova jaro jam staras sur la sojlo. Grava okazintaĵo okazis dum 1966 : la transdono de la Propono al Unuigintaj Nacioj. En Kongo mem pliaj novaj kursoj startis kaj nia delegita reto de U.E.A. pligrandiĝis. Plue nia Instituto estis akceptita kiel aliĝinta nacia asocio de U.E.A. dum la Universala Kongreso en Budapest. Ni finas la jaron kun 26 membroj. Ni faru nian eblon por ke tiu nombro dum 1967 duobliĝu ! Tial mi alvokas ĉiujn esperantistojn en Kongo fariĝi efektivaj membroj de K.E.I. Tial ankaŭ mi alvokas la aktivulojn malfermi kursojn kie eblas, por ke nia movado fariĝu pli forta, pli impona, kvante kaj kvalite.

Mi samtempe bondeziras al vi ĉiuj: - ankaŭ al niaj amikoj en eksterlando - feliĉon, prosperon kaj pacon por la nova 1967-a !

Sincere via

Louis NGINGI

\*\*\*\*\*  
GENERALA KONFERENCO DE U.N.E.S.K.O. (Parizo 1966)

Studo pri la objektiva bezono kaj la eblecoj de internacia lingvo ; Projekto de rezolucio prezentita de Danujo, Finnlando, Islando, Norvegujo kaj Svedlando je 19 novembro 1966.

La Generala Konferenco ,

Konsiderante ke la nombro de ŝtatoj kreskas rapide dum la jaroj kaj samtempe la bezono faciligi la kontaktojn inter la diversaj nacioj kaj popoloj,

Notante, ke la bezono de pli bonaj komunikiloj inter la popoloj kaj ke la neceso pri internacia terminologio kreskas en teknikaj aferoj,

Rekonante ke tiu problemo kreskas de tago al tago kaj ke UNUESKO estas la ĝusta organo por studi tiun aferon, kiu estas grava el socia, kultura kaj teknika vidpunktoj,

Rekomendas al la Generala Direktoro antaŭvidi necesajn monrimedojn en la labor-programo kaj la budĝeto por 1969 - 1970 por funkciigi internacian komisionon el pedagogiaj, lingvaj kaj teknikaj ekspertoj por objektive studi, en kiuj aferoj estas bezono de internacia lingvo kaj esplori per kiuj komunikiloj estus eble kontentigi tiun bezonon.

(vidu alian paĝon . . .)

GENERALA KONFERENCO DE UNESKO. (sekvo)

Rimarko : Pro la amasiĝo de proponoj, la Konferenco bedaŭrinde decidis ne voĉdoni pri tiuj proponoj, kiuj temas pri la Estonta Programo, sed transdonis ilin al la Generala Direktoro por prijuĝo.

En ĉiu okazo nun denove aktualiĝis en UNESKO, la supera kultura organo de la mondo, la problemo de internacia lingvo.

ALVOKO DE DELEGITO AL UNUIGINTAJ NACIOJ . . .

Ci-tiu artikolo sendis al ni nia kanada amiko VLADISLAVO ZYGMUNTOWICZ kiu interalie skribas : "Ni Esperantistoj neniam venkos per silento. Ni venkos per bruo. Ni ne bezonas pafi per kugloj. Ni devas pafi per vortoj !"

Estimataj "Unuiĝintaj Nacioj" !  
Estimataj Gedelegitoj !

Mia nomo estas VLADO AKRA-BUSA.

Mi estas delegito de ĵus liberigita lando GANĜALIO.

Ni, ĝanĝalianoj, kore dankas al Unuiĝintaj Nacioj ke ili bonvolis helpi nin al la liberigo.

Ni plene apogas "Unuiĝintaj Nacioj" kaj ni klopodos servi se eble plej bone.

Sed mia nacio opinias ke la organizo de "Unuiĝintaj Nacioj" devus esti :

honestaj,

demokrataj,

riĉaj kaj forta.

Malfeliĉe, ĝis hodiaŭ tia ne estas.

Ne estas honeste kiam unu potenca nacio atakas la alian malfortan, kaj la organizo de "Unuiĝintaj Nacioj" faras nenion.

Ne estas ĵuste se iu fortega nacio elektas la registaron por aliaj malfortaj nacioj.

Ne estas demokrate kiam la malgrandaj nacioj devas uzi la lingvon de la grandaj.

ĈIUJ UZU INTERNACIAN LINGVON ESPERANTO !

La organizo de "Unuiĝintaj Nacioj" devus esti ankaŭ riĉa. Se la homoj pagas grandajn impostojn al la ŝtatoj, kial la ŝtatoj pagas nur malmulte al "Unuiĝintaj Nacioj" ?

La organizo devus esti ankaŭ forta. Ĝi devus havi propran armeon, dependan, ne de la ŝtatoj, sed nur de "Unuiĝintaj Nacioj".

Tiu armeo devus kreski !

Samtempe malkreskus senbezonaĵaj naciaj armeoj.

Kompreneble, la soldatoj parolus Internacian Lingvon

ESPERANTO.

Jen programo de mia lando GANĜALIO. Por tiu-ĉi programo ni laboros.

Vivu "Unuiĝintaj Nacioj" !

VIVU ESPERANTO,

LINGVO ESTONTECA -

VIVU LA TUTMONDA

LINGVO TUTHOMECA !

KIAL NI NE SENDUS DELEGITON EL KONGO AL U.K. EN TEL AVIV ??? . . .

Jen stranga demando, sed ĉi-tiu demando estas adresita al la eksterlandaj esperantistoj.

La problemo aspektas tiel : la Esperanto-movado en Kongo ne disponas pri sufiĉe da monaj rimedoj por povi pagi vojaĝon por sendi delegiton al U.K. en TEL AVIV. Mankas proksimume 10.000 belgaj frankoj (200 usonaj dolaroj). Tamen estus tre interesa se konga delegito povus reprezenti sian landon ĉaj movadon - por la unua fojo en la historio de la U.K. - en TEL AVIV. Kial ni, samideanoj en eksterlando (asocioj, kluboj, unuopuloj), ne partoprenus al tiu realigo ?

La solvo estas tute simpla : ĉiuj kiuj volas spezi per donaco tiun :

" K.E.I.-konto por TEL AVIV "

Ĝiru al Bankkonto n° 200.162 de S-ano BRAET , SOCIETE GENERALE DE BANQUE ,  
B R U G G E (Belgujo), ĝis kiam la sumo bezonata estos atingita.

Tiu speciala konto jam posedas : 1.000 belgaj frankoj . . . Restas do 9.000 belgaj frankoj (180 usonaj dolaroj).

Asocioj, grupoj, unuopuloj, ekagu TUJ : via faro alttaksota donos svingiĝon al la movado en Centra Afriko, kontinento kie nia movado DEVAS akiri kaj plifirmigi strategian pozicion !

K.F. BRAET

(belga esperantisto deĵorante en Kongo  
ĝis fino de junio 1967)

A l v o k o : ĉiuj esperanto gazetoj kaj revuoj en evoluintaj landoj bonvolu represi. Dankon !

\*\*\*\*\*

L'ESPERANTO DANS LE MONDE . . .

LA B.B.C. DIFFUSE DES PROGRAMMES EN LANGUE INTERNATIONALE ESPERANTO.

Londres.- La B.B.C., qui émet déjà des programmes en de nombreuses langues de tous les continents, a diffusé, à titre expérimental, un nouveau programme, en Langue Internationale Espéranto. L'Espéranto est encore une langue très jeune (elle existe depuis seulement 80 ans environ), mais elle a déjà des usagers en 90 pays et elle est vraiment internationale, car elle n'appartient à aucun peuple ni aucun pays en particulier. C'est, semble-t-il, dans les pays d'Europe Orientale - Bulgarie, Hongrie, Pologne et autres - qu'elle est la plus connue et la plus utilisée. C'est pourquoi la radio britannique a décidé d'introduire des programmes en Espéranto dans le cadre des émissions destinées à cette contrée. Provisoirement, les programmes d'Espéranto sont mensuels, et ont lieu à 21h15 MG sur ondes courtes, de 25 à 49 m, le dernier jeudi de chaque mois. Notons que les stations de radio de Budapest et Varsovie ont des programmes quotidiens en Langue Internationale. Radio Pékin donne six émissions par semaine en Espéranto, s'adressant à l'Europe et l'Asie.

LE PROBLEME DE LA LANGUE INTERNATIONALE A L'U.N.E.S.C.O.

Paris.- La Conférence Générale de l'U.N.E.S.C.O. qui prit fin le 30 novembre 1966 à Paris, a décidé de recommander au Directeur Général de cette organisation d'explorer, pour la période de travail 1969 - 1970, les possibilités d'étudier - à l'aide d'une commission d'experts - le besoin et les possibilités d'utiliser une langue internationale à côté des langues nationales pour les différentes sphères de l'activité humaine. La question fut officiellement soulevée par le Danemark, la Finlande, l'Islande, la Norvège et la Suède.

LORS DES CONFERENCES INTERNATIONALES LA DIVERSITE DES LANGUES CONSTITUE UNE LOURDE CHARGE FINANCIERE.

New-York.- Des documents récemment publiés par l'O.N.U. ont permis d'entrevoir une partie du montant énorme des dépenses provenant de la diversité des langues dans la vie internationale. L'un de ces documents (A/C.6/L.600), notamment, évaluait les dépenses relatives à une conférence sur les Conventions Internationales qui se déroulera à New-York et à Genève. Selon cette évaluation, les honoraires des interprètes s'élèveront à 157.565 dollars, et le coût de la traduction atteindra 137.574 dollars ; donc, au total, 295.139 dollars pour les seuls frais d'interprètes et de traducteurs.

On peut comparer ces chiffres avec ceux, précédemment publiés, relatifs à la Session d'Eté du Conseil Economique et Social des Nations Unies en 1965 : "presque un demi-million de dollars pour la seule traduction" (Doc. A/6343). Le total, en ce qui concerne les interprètes et les traducteurs pour une session d'un seul des Organismes spécialisés de l'O.N.U. atteignait donc environ un million de dollars.

Non seulement ces dépenses, mais aussi les salaires des dactylographes, les frais de correction et de polycopie des documents sont proportionnels au nombre de langues utilisées.

\*\*\*\*\*  
K.E.I. - k o m u n i k o j . . .

- Du novaj grupoj aliĝis al K.E.I., nome :

. AFRIKA ESPERANTISTA GRUPO EN BELGUJO - Prezidanto : S-ro MPOY Jacques-Hilaire, rue Crapouillet, 23, BRUXELLES 1, Belgujo ;

. LA STELO (Esperanto-grupo de Kalamu) - Prezidanto: S-ro MAFWALA Ignace; Sekretario: S-ro NKOKO Benoît ; Kasisto: S-ro NSEKA Vincent ; Sekretaria adreso : La Stelo, rue Yoko, 9, Yolo-Sud, KALAMU - KINSHASA, Kongo ;

- Grava novaĵo : La Universala Kongreso en Budapeŝt akceptis "Konga Esperanto-Instituto"-n kiel aliĝintan landan asocion de U.E.A. La Estraro de K.E.I. elektis S-ron TSHIBALA Alphonse kiel observanton en la komitato de U.E.A.

- Nova elementa kurso startis en KALAMU (Kinshasa) la 20/11/66 sub la gvidado de S-anoj TOKO Louis kaj NKOKO Benoît ; ok lernantoj enskribiĝis.

- La "Société Espérantiste de Lyon" (Francujo), 7, rue Major Martin, LYON, donacis al nia konto ĉe U.E.A. 22 guldencojn. Koran dankon, samideanoj !

\*\*\*\*\*

DEZIRAS KORESPONDI . . .

- . Deziras kontakton kun konga samideano, esperant- aŭ franclingve. Estas preta interŝanĝi poŝtmarkojn. Skribu al : S-ro Andreo SEMENOV, Delegito de U.E.A., P.O.Box 31, JAROSLAVL, U.S.S.R. ;
- . F-ino J.BRUNIER, 2, rue Camélinat, 42-St.ETIENNE, France : serĉas seriozan kongan korespondanton por daŭre interŝanĝi leterojn, ktp. Skribu tuj, mi petas !
- . Juna pola esperantisto, 18-jara, serĉas kongan korespondanton. Interŝanĝas ilustritajn poŝtkartojn, poŝtmarkojn. Skribu al : S-ro Jerzy DRYJA, KALISZ, Strato Staszica, 28a, Loĝejo 16, WOJ. POZNAN, Pologne ;
- . Fervojojficisto 33-jara ŝatas korespondi kun konga amiko : S-ro Zdenek SIFTA, Oskocinek 147, okz. NYMBURK, Tchechoslovaquie ;
- . Deziras interŝanĝi bildkartojn, poŝtmarkojn, fotojn, gazetojn, ktp. : S-ro Fusaeugu KIDO, Higasi Mukojima 3-16-4, SUMIDA, TOKIO, Japon ;
- . Junaj gelnernantoj serĉas korespondamikojn. Ni respondos tuj. Skribu al : S-ro P.PETERSON, pr. Gajdara 48-41, TAŜKENT 105, Uzbekistano, U.S.S.R. ;
- . Konga instruisto skribu tuj al : S-ro Henerik KOCHER, Rua José Higino 270 c. X apt.101, TIJUCA, Guanabara, Brésil ;
- . 52 gekursanoj (19-35 jaraj) en Varsovio, plejparte virinoj, deziras korespondi kun konganoj. Skribu tuj al : S-ino Hanna KURKIEWICZ, Pola Esperanto Asocio, VARSOVIO, ul.Nowy Swiat 27, Pologne ;
- . Dulgara instruistino treege deziras kontakton kun kongaj gesamideanoj. Skribu senprokraste al : S-ino Elena KORAĈEVA, Str. T. Burmov 13, GABROVO, Bulgarie ;
- . Hispana muzikisto korespondant(in)on en Kongo. Adreso : S-ro Antonio MOYA, Infanta Mercedes, 34, MADRID (20), Espagne ;
- . Volas interŝanĝi AFRIKA REVUO kun la kvaronjara ilustrita revuo HUNGARA VIVO. Sendu al : D-ro Arped Máthé, BUDAPEST XI, Baranyai ut 31/B 24, Hongrie ;
- . 29-jara bibliotekistino volas korespondi kun konga amiko. Ankaŭ interŝanĝas poŝtmarkojn. Skribu al : Inez KEMENES, PECS III, 39-es dandar ut I/C. I. 1. Hongrie ;
- . 24-jara studento volas korespondi kun kongaj gesamideanoj. Ŝatas muzikon, kinoarton kaj dancadon. Skribu al : S-ro Avo SUUNMETS, str. Lomonossov 9-406, TALLINN, Estonie, U.S.S.R. ;

\* \* \* \* \*